

## FAKA LITERATURO EN ESPERANTO.

En sia plej nova libro, „Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo” (pri kiu recenzo sekvas en la proksima numero), Prof. d-ro Ivo Lapenna en la antaŭparolo diras: „Estas konate, ke libroj kun eĉ nur iom faka karaktero ne estas tre multnombraj en nia lingvo. Por ili, tute simple, ne ekzistas sufiĉe granda legantaro. Sciencisto aŭ alia fakulo posedanta Esperanton — kaj tiaj ne mankis kaj ne mankas — sentas sin devigata verki ne en la lingvo, kies literaturon li dezirus riĉigi kaj kies progreson li volus akceli, sed en sia gepatra aŭ en alia nacia lingvo. Dum la pli ol sesdekjara ekzisto de Esperanto tio estis preskaŭ senescepta regulo. Fakte, sendube, tre bedaŭrinda, kiu ne nur senigis nian literaturon de valoraj verkoj, sed ankaŭ bremsis la evoluon de la faka lingvobranĉo.

La plibonigo de tiu stato ne troviĝas nur en la manoj de la verkistoj. Por ke la faka kaj scienca literaturo kresku pli konsiderinde, estas nepre necese, ke ekzistu sufiĉe multnombra publiko ..... Nur la koincido de la du kondiĉoj — preteco de la verkistoj publikigi siajn fakajn laborojn originale en Esperanto kaj sufiĉa interesiĝo de la publiko por tiaj verkoj — donas fekundan grundon por kreskigo de tiu valoraj planto.”

Gratulon al la aŭtoro, ke li, — ne sekvante la malbonan kutimon de multaj ĝisnuna sciencistoj esperantistaj kiuj publikigis la rezultojn de sia scienca laboro ne en Esperanto, sed en diversaj naciaj lingvoj, — pliriĉigis la Esperantan literaturon per nova faka verko, kiu meritas tamen interesiĝon de la tuta esperantistaro. Post ĉi tiu gratulo mi rimarku ke tio, kion li diris, validas pri libroformaj publikigaĵoj pli, ol pri artikoloj en sciencaj gazetoj. Mi kredas ke pri la granda plimulto de la sciencaj artikoloj, kiuj en ĉiam kreskanta nombro aperas en multego da fakaj gazetoj ĉiulingvaj, oni devas atesti, ke nur tre malmultaj legas ilin; kaj legas ilin ordinare ne la abonantoj de la koncernaj gazetoj (kiuj abonantoj ofte estas bibliotekoj), sed tiuj fakuloj kiuj en iu momento, pro la propra laboro, estas kvazaŭ devigataj legi ilin, kaj nur malofte kaj malfacile povas elturniĝi pro nekono de la lingvo. Kaj tie estas nia ŝanco! Ne ekzistas sciencisto kiu ne povas legi almenaŭ unu el la tri science plej uzataj okcidenteŭropaj lingvoj, la lingvoj el kiuj ĉefe fontis la vortaro de la internacia lingvo. Por tiuj sciencistoj kiuj konas ĉiujn tri, ne estos, ĝenerale, tre malfacile divenante legi siafakan artikolon. Por tiuj kiuj konas nur unu, sendube estas pli malfacile, sed aliflanke, eĉ pli necese. Ne estas verŝajne ke sciencisto unufoje renkontinte esperantlingvan artikolon, decidus lerni la internacian lingvon, sed ju pli oftaj estos tiaj renkontoj, des pli multaj sciencistoj decidus tion fari.

Sendube, niaj antaŭuloj kiuj ne publikigis siajn artikolojn havas ekskuzon: kie trovi redakcion de scienca aŭ teknika gazeto kiu akceptas artikolojn en la lingvo internacia? Eĉ nun tiu malfacilaĵo ekzistas. Tamen, ni scias ke multaj japanaj gazetoj jam delonge efektive akceptas tiajn artikolojn. La iama ekskuzo do nun jam ne plu estas valida.

Tre ĝojiga estas la promeso de multaj japanaj sciencistoj publikigi, almenaŭ parton de sia laboro, en Esperanto. Aliĝis ankaŭ ĉinaj scienculoj. Ankaŭ kelkaj okcidentaj scienculoj jam praktikas la publikigadon en Esperanto, dum pli granda nombro resumas siajn nacilingvajn artikolojn internacilingve.

Lastatempe mi ricevis i.a. el Japanujo la unuan numeron de „Bulletin of the Faculty of Agriculture Yamaguti University” (1950) kun tri resumoj en Esperanto post originalaĵoj en japana lingvo; artikolon de Yukito Oota pri „Inhibitory Effect of Caffeine and Methylene Blue on Amine Oxidase” (J. Biochem. (Japan) 37 (1950) 289) en la angla lingvo kun resume en Esperanto; du franclingvajn artikolojn de F. Jelenc kun internacilingvaj resumoj, unu, titolitan „Les formations végétales des environs de Tlemcen” en Bulletin de la Soc. de Géographie et d'Archéologie de la province d'Oran, 66-67 (1945-1946), kaj unu pli freŝdatan en Bulletin de la Soc. des sciences naturelles du Maroc, 30 (1950) 3, sub titolo: „Anatomie de la tige et de la feuille des Aristida de l'Afrique du Nord”.

D-ro W. J. Nijveld donove publikigis kelkajn artikolojn en la nederlanda farbfaka gazeto „Verfkroniek” kaj aldonis esperantajn resumojn. La traduko de la titoloj estas: „Propecoj de Farboj kaj Farbtavoloj” (24 16-18), kaj „Pri la Ebloj de Normigo de Farboj (24 19-21). En „Progress of Theoretical Physics” (5 696-717) d-ro Z. Koba aldonis esperantlingvan resumon al anglalingva artikolo kies titolo estas „Note on a Lorentz-Invariant Integration in the Quantum Field Theory”. La numero (4a) en kiu ĝi aperis, estas speciala numero, eldonita je la honoro de la Nobel-premiita Hideki Yukawa. kaj enhavas kontribuojn ankaŭ de multaj eŭropanoj kaj amerikanoj, inter kiuj pluraj Nobel-premiitoj.

Gratulon al ĉiuj aŭtoroj kaj al ĉiuj progresemaĵoj gazetredakcioj kiuj tiel pioniras.

Sed jam leviĝis nova problemo. El ĉiutaga sperto mi scias kiel mizera estas la lingva nivelo de multaj artikoloj verkita (aŭ traduktita) en por la aŭtoro fremda lingvo. Sur preskaŭ ĉiu paĝo de multaj sciencaj gazetoj la mizera lingvokono de aŭtoroj, devigita uzi ĉu por sia artikolo mem, aŭ por la aldonita resume, fremdan lingvon, sin trudas al nia konscio. Nu, oni povas konfesi ke vere korekta uzo de fremda nacia lingvo, por orientanoj ofte eĉ tute malsimila lingvo, estas io por preskaŭ neniu atingebla. La internacia lingvo, tamen, estas tiom pli facila, kaj ankaŭ lasas tiom pli da libero, ke korekta uzo de ĝi ne superas la kapablojn de la plimulto de la sciencaj aŭtoroj. Tamen, ĝis nun nur tre malmultaj kontentigas ĉi tiun normon. Bedaŭrinde oni devas diri ke la lingva nivelo de multaj el la relative ankoraŭ malmultaj esperantaj resumoj kaj sciencaj artikoloj estas nepre sub la normo, ofte eĉ tre multe sub la normo. La intenco plimultigi la esperantajn artikolojn kaj resumojn urĝigas la neceson trovi rimedojn por plialtigi la lingvan kvaliton. Ekzistas por tio du rimedoj: unue, la sciencistoj individue zorgu pli-

bonigi, ja, perfektigi sian scion pri la lingvo, sian sperton kaj lerton uzi ĝin ne sub, sed laŭ la normo, kaj due, oni donu siajn manuskriptojn al aliaj, lingvospertaj, kaj se eble ankaŭ fakospertaj, samideanoj por kritiko. Ja multaj bone redaktataj, kaj lingve neriproĉeblaj gazetoj aperas en ĉiuj partoj de la mondo. La lingvospertaj samideanoj do nepre ekzistas. La sciencaj aŭtoroj ne preterlasu sin turni al tiaj por kritiko. Ni ne povas esti tro zorgaj pri la lingva nivelo de niaj publikigaĵoj. Se aŭtoro verkas en ia fuŝita germana aŭ angla, la plej malbona konsekvenco estas ke eble oni ne komprenos lin. La sekvoj de fuŝa uzo de la internacia lingvo, kies faka lingvaĵo ankoraŭ estas en stato de disvolviĝo, povas esti multe pli malbonaj: aliaj povos imiti la fuŝaĵojn.

Tial: publikigu en la lingvo internacia, sed ..... zorgu ke lingve via publikigaĵo ne restu sub la normo.

Mi rekomendas ĉi tiun temon al la Sekcio „Esperanto en Scienco kaj Tekniko” de la proksima Universala Kongreso en Oslo.

La Redaktoro.

5 : 001.4 = 089.2

33 : 001.4 = 089.2

### DISKUTO PRI TERMINOJ.

Profesoro Belinfante en letero rimarkis: *kalkuli* (= *to calculate*), *nombri*, *denombri* (= *to count*), *komputi* (= *to compute*). — *Komputado* ne uzas diferencaĵan kalkulon aŭ ion similan. Oni povas *kalkuli* same per literoj (algebro) kiel per nombroj. Oni povas *komputi* nur per nombroj; ĝi konsistas el aritmetiko plus uzo de (logaritmaj aŭ iuj ajn aliaj) tabeloj, interpolado (kun formuloj por tiu celo), uzado de komputaj maŝinoj, k.t.p. Oni *komputas* integrajn per integriĵoj aŭ per sumigo, oni *kalkulas* ĝin per analitiko. Do *komputi* tute ne estas sinonimo de *nombri* (komparu Sc. R. 2 144).

*Relaso* (en esceptaj kazoj ankaŭ *relasado*) estas bona vorto por „*relaxation*”. (Komparu Sc. R. 1 22; 2 148-9). *Magneta indukdenso* estas preskaŭ same bona kiel (iomete pli bona) *magneta fluksdenso* (Komparu Sc. R. 2 149-150).

S-ro A. D. A t a n a s o v, kiel ankaŭ s-ro F. J e l e n c, opinias ke superflua estas la neologismo „*specio*”. La angla lingvo diferencigas inter ambaŭ nocioj, sed tion ne faras ekzemple la franca, la germana kaj la rusa. Li ankaŭ esprimas preferon por „*planto*” (kompare kun kreskaĵo, vegetaĵo kaj vegetalo).

Via redaktoro multe cerbumis por trovi la plej taŭgan esprimon por tio kion oni en la ekonomio nomas (A) *commodity*, *good(s)*, (F) *bien*, (G) *Gut*. Enciklopedia Vortaro (Wüster) donas por tio la vortojn „*bonaĵo*” kaj „*bonumo*”. Mi devas konfesi tamen, ke ambaŭ esprimoj por ĉi tiu nocio mal-

multe plaĉas al mi. Mi mem prove uzis kaj „*poruzaĵo*” kaj „*utilaĵo*”, sed ankaŭ tiuj ne tute kontentigas min. Mi ankaŭ pensis pri enkonduko de nova radikoj, ekz. *bjeno*, *bueno*, *buonon*, aŭ *gudo*, sed ankoraŭ ne estas konvinkita pri la nepra dezirindeco de tia enkonduko, nek certa pri tio kiu nova radikoj eventuale estas preferinda. Mi volonte ricevos la opiniesprimojn kaj konsilojn de kompetentaj legantoj. Nur ne konsilu la uzon de tiaj vortoj, kiaj estas ekz. *varo*, *artiklo*, *produkt(a)ĵo*, ĉar tiaj nepre havas alian, malpli vastan signifon. La signifo de la serĉata termino estu: io materia, havanta aŭ ne havanta ekonomian valoron, kaj kapabla servi rekte aŭ pere la kontentigon de homaj bezonoj.

Fine ni diskutu kelkajn kemiajn terminojn. Ĉi-foje temu ĉefe pri kelkaj verboj. La Enc. Vortaro donas, ekz., jenajn vortojn: *hidrogeni*, *bromi*, *jodi*, *klori*; kaj simile oni povas krei: *acetili*, *metili*, *oksidi*, *nitri*, *sulfon(at)i*, k.t.p. Mi nepre aprobas ĉi tiajn terminojn. Aliaj samfakanoj (ekz. d-ro D u n c a n, kun kiu mi jam korespondis pri la afero) preferas formojn kun la sufikso *-ig-*, do ekz. *oksidigi*, *nitrigi*, k.t.p. D-ro D u n c a n argumentis jene:

La pasivaj participoj kun la sufiksoj *-at-* kaj *-it-*, kiujn oni derivas de multaj el la supraj verboj ne distingiĝas laŭforme de certaj alisignifaj kemiaj terminoj: ekz. *bromata*, *bromita*, *jodata*, *jodita*, *klorata*, *klorita*, *metilato*, *nitrato*, *nitrito*, *sulfonato*, k.t.p. kaj tio povas kaŭzi miskomprenojn. Tio estas vera, sed tiaj miskomprenoj estas tre facile eviteblaj.

En la verbaj participoj oni ja povas uzi la sufikson *-ad-* en ĉiuj kazoj kie alikaze miskompreno eblus. La malinklino de la alia partio uzi la verbojn kun *-ig-* trovas sian klarigon en tio, ke „*klor(ig)i*” ne signifas „*igi kloro*”, „*oksid(ig)i*” ordinare ne signifas „*igi oksido*”, „*hidrogenigi*” ne signifas „*igi hidrogeno*”, k.t.p. Por mi tiaj verboj kun *-ig-* estus iomete akcepteblaj nur, se oni interpretus ilin kiel hidrogen(ad)igi, klor(ad)igi, oksid(ad)igi, nitr(ad)igi, k.t.p., do kiel la transitivigaĵoj de aliaj, ankaŭ transitivaj, verboj. Ili estus kompareblaj al la paro: anstataŭigi kaj anstataŭi. Sed, pro la substantiva karaktero de la radikoj en (preskaŭ) ĉiuj kazoj, tiaj formoj, sen la aldonita sufikso *-ad-*, ŝajnas apenaŭ permeseblaj. Restus, kompreneble, la eblo uzi alian sufikson, ekz. *-iz-* aŭ *-um-*, kiun solvon, cetere, mi trovas ne tre rekomendinda ĉar ĝi necesigus ĉiaman uzon de ekstra sufikso, dum la sufikso *-ad-* estus necesa nur antaŭ la jenaj elementoj: *-at-*, *-it-*, *-ig-*, kaj *-iĝ-*, kaj antaŭ la unuaj du nur en parto de la kazoj.

Kvankam la terminoj „*sulfurila klorido*” kaj „*fosforila klorido*” estas konformaj al la respondaj terminoj en la naciaj lingvoj, mi tamen opinias ke en Esperanto ni preferu la regulajn formojn „*sulfita* kaj *fosfita kloridoj*”. En la lingvoj angla kaj franca oni derivas la nomojn de la acidokloridoj de la nomoj de la acidoj anstataŭigante la sufikson *-ic*, resp. *-ique* per *-yl*, kaj tial en tiuj lingvoj la nomoj *sulfuryl* kaj *phosphoryl* estas regulaj. En Esperanto oni anstataŭigas la sufikson *-at-* per *-il-*, kio kondukas en la kazoj koncernataj al la formoj „*sulfil-*” kaj „*fosfil-*”.

La Redaktoro.